

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Adolf Burkhardt

1. Leviĝas luno; hele
orpompas surĉiele
la steloj al l'okul'.
Arbaro mute revas;
el la herbej' sin levas
mirinde blanka la nebul'

2. Ripozas mont' kaj valo
sub la krepusk-vualo
trankvile kvazaŭ lag'.
Por vi jen la permeso
fordormi en forgeso
la malbonaĵojn de la tag'.

3. La luno nur duone
Prezentas sin impone;
ĝi tamen estas sfer':
Facile ni priridas
aferon, se ni vidas
nur parton de la plena ver'.

4. Homidoj ni fieraj
pekuloj nur, mizeraj;
ne multon scias ni.
Ni teksas iluziojn
kaj serĉas multajn sciojn
kaj devojiĝas pli kaj pli.

5. Ho Di', nin lasu vidi
la Savon, ne plu fidi
vantaĵojn de l' pasem'!
Nin faru simpl-animaj,
infane Dio-timaj
en ĝoj', jam nun sen zorga trem'!

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Otto Bonte

1. La luno jam leviĝis,
Steletoj ekheliĝis,
Ravante homojn nin;
Silentas la arbaro
Kaj super la kamparo
Nebulo pala levas sin.

2. Ho, mondo la kvieta,
Kaj kiel ŝajnas eta
Krepuska en kovril';
Por ke vi en ĉambreto
Samkiel infaneto
Senzorge dormu en lulil'.

3. Rigardu nun la lunon,
Vi vidas nur duonon,
Sed tamen ronda ĝi.
Ni ofte ion ridas,
Ĉar ni ne klare vidas,
Ke ĉie regas harmoni'.

4.
.....
.....
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....
.....
.....

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Joachim Gießner

1. La luno jam leviĝis,
steletoj ekheliĝis,
ravante homojn nin.
Silentas la arbaro
kaj super la kamparo
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,
la mond' ne plu sin movas
sub paca, klara lun'.
Nun petu noktan benon,
de l'tago la ĉagrenon
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo
en brila ronda belo
duon-videbla nur.²
Ĉar multon ni ne vidas,
ni ofte ĝin priridas,
malsaĝe juĝas kun plezur'.

4.
.....
.....
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....
.....
.....

...

²S-ro Gießner unue tajpis:
duona tamen nur.

6. Vi fine, sen ĉagreni,
el mond' nin volu preni
per milda morto for.
Nin tiam al ĉielo
venigu, al la celo:
Vi, nia Dio kaj Sinjor'!

6.
.....
.....
.....
.....
.....

6.
.....
.....
.....
.....
.....

7. Gefratoj, nun ekkuŝu!
Vin nokta vent' ne tuŝu,
dum ŝirmas anĝelar'.
Indulgu, Di', nin grace,
por ke nun dormu pace
ni kaj malsana la najbar'.

7. Ekkuŝu nun, gefratoj,
De bona Di' ŝirmataj
Kun tuta la homar'.
Kar-Dio ne nin punu,
Trankvilan dormon donu
Kaj al malsana la najbar'!

7. Ĉe l'fino de la tago
kuŝigu vin sen plago,
silentas la anim'.
Ne punu nian faron,
sed nin kaj la najbaron
dormigu, Dio, nun sem tim'.

*Traduko de la Germana poemo
"Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS
(*1740-08-15 - †1815-01-21) en
Esperanton de ADOLF BURKHARDT
(pastro, *1929-04-10 - †2004-04-02).*

*Traduko de la Germana poe-
mo "Abendlied" de MATTHI-
AS CLAUDIUS (*1740-08-15 -
†1815-01-21) en Esperanton
de Otto Bonte.*

*Traduko de la Germana poe-
mo "Abendlied" de MATTHI-
AS CLAUDIUS (*1740-08-15 -
†1815-01-21) en Esperanton de
JOACHIM GIESSNER (*1913-12-
23 - †2003-11-25).*

Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)

Arg-394-779 (2007-03-26
22:31:58)

Arg-394-782 (2007-03-28
09:55:34)

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred
Retzlaff, prenis el la kant-libreto "Mia
kantaro I", dua eldono de Majo 1998,
kompilita kaj eldonita de s-ro Josef
Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050
Villingen-Schwenningen, Germanio.
Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la
permeson.*

*Tiu ĉi traduko estas publikigi-
ta en 1984 en "Esperanto ak-
tuell", la organo de Germana
Esperanto-Asocio, sur la aldo-
naj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 15
de la numero 6/984. Mi, Man-
fred Retzlaff, detajpis la tradu-
kon el tiu, en 2007-03-26. Eni-
gis la tradukon de Otto Bonte
d-ro Dirk Willkommen, la ti-
ama redaktisto de "Esperanto
aktuell", .*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis ti-
un tradukon de Joachim Gießner
el folio kun letero, kiun skribis al
mi en 1987-11-24 s-ro Joachim
Gießner. Li skribis en tiu lete-
ro, ke la fakto, ke lia traduko de
la unua strofo estas tute la sama
kiel en tiu de Otto Bonte, estas
hazardo kaj ke li ne sciis antaŭe
la tradukon de Otto Bonte.*